

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2009:1

La kupra minejo en Falun, Dalekarlio

En la Dalekarlia urbo Falun ni havas unu el la plej malnovaj entreprenoj en la tuta mondo. Jam en la mezepoka tempo oni komencis uzi la kupron en la tereno. En la deksepa



La plej malnova skribita dokumento pri la minejo en Falun estas ŝangletero de 1288, kiam la episkopo Peder Elofsson en Västerås, aĉetis unu okonon de la minejo.



La mineja truoj.

kaj dekoka jarcentoj tri kvaronoj de la tuta mondeksporto venis el la minejo. Kupro de Falun estis eksportita al Portugalio, Hispanio, Nederlando, Anglio, Hessen kaj aliaj landoj en Eŭropo. De la materialo oni produktis monerojn, kuirejajojn aŭ tegmentkovraĵojn. Sur preĝejoj, kasteloj kaj palacoj oni kovris la tegmentojn kun brilanta kupro de Falun. Ne strange ke la "Kupromonto" (Kopparberget) estis nomita "la trezorĉambro de la reĝejoj" kaj kaj "la plej granda miraklo de Svedio".

La historio de la monto estas pli ol miljara. La plej malnova skribita pri tio estas ŝangletero de 1288, kiam la episkopo Peder Elofsson en Västerås, aĉetis 1/8 de la minejo. Ni ankaŭ havas la privilegian akton de 1347 de la reĝo Magnus Eriksson por la Kupromonto. Tie estis regulita minejekspluatado, loĝado, komerco, manlaboro k.t.p. Estis konstruitaj strangaj teknikaj konstruaĵoj ĉe la minejo. La minejo estas bone esplorita kaj dokumentita en belaj mapoj kaj bildoj. Multaj konataj mineralogoj, kemistoj kaj inĝenieroj laboris ĉe la Kupromonto.

Inter ĉiuj famaj homoj nomo de malriĉa laboristo estas memorinda pli ol aliaj nomoj. Mats Israelsson de Boda vilaĝo en Svärdsjö mortis en mineja akcidento en 1677 kaj ne estis trovita antaŭ 1719. La vitriola akvo konservis lin kaj Mats estis eksponiita en vitra kesto ĉe la minejo. Homoj proksime kaj malproksime venis por rigardi lin. Oni diras ke maljunulino rekonis lin kiel sian fianĉon de ŝia juneco. Tiu Mats estis la unua turista vidindaĵo ĉe la monto. Nuntempe Mats ripozas

sub bela tomoŝtono ĉe la preĝejo Stora Kopparberg. Sed la romantika rakonto pri Mats kaj lia fidela fianĉino estis rakontita grandparte de la mondo. Estis skribita poemoj, romanoj kaj eĉ operoj pri la kompatinda kupra laboristo de Falun.

*"Tiu ne vidis la Kupromonton,
tiu ne vidis Svedion"*

Al la kupra minejo en Falun venis amasoj de vojaĝantoj kaj turistoj. La Kupromonto estis atraktiva vojaĝ-celo jam en la deksepa jarcento. Oni diras ke La reĝo Gustavo II Adolfo dum vizito en la subtero esprimis: "Kiu potenculo havus similan palacon kiel mi?". Carl von Linné priskribis 1734 la minejon kiel "teruran kiel la infero mem". La kupra muzeo de 1922 estas la plej malnova teknika muzeo en Svedio.

Ĉu vi sciis ke Falun en la deksepa jarcento estis la dua granda urbo de Svedio?

En la jaro 1687 granda parto de la minejo estis detruita. La rezulto estas grandega truoj, svede nomita Stora Stöten. Nuntempe ĝi estas 95 metroj profunda kaj 350 metroj larĝa. Oni ofte priskribas la Kupromonton kiel svisan fromaĝon. Sub Stora Stöten estas 33 kilometroj de koridoroj kaj submontaj ĉambroj. La plej granda profundo estas 440 metroj.

Oni nuntempe povas viziti la minejon gvidata de gvidanto. Tion ni faros dum la SEF-kongreso en majo. Mi nun ne skribas pli sed lasas la aferon al la profesia gvidanto.

Åke Rohdin

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet
ISSN 0014-0694
Monato 2008 • 97-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm och Olof Pettersson
Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:
EsperantoCentro, Vikingagatan 24, 113 42
Stockholm, tel. 08-34 08 00. sveda@esperanto.se

E-post: esperanto@globalnet.net

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2009: 200 kr.

Prenumerationsavgift för La Espero ingår i medlem savgiften.

Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sveda@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2008:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Masthuggsliden 1, 413 18 GÖTEBORG

Postgiro: 578-5 Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@telia.com Telefon: 031 - 12 05 94.

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.e-g.se E-post: egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11

961 76 Boden, tel. 0921-123 54

e-post: esperanto@globalnet.net

Stoppdatum Ut kommer senast

Nr 1 15 januari 15 februari

Nr 2 28 februari 30 mars

Nr 3 30 april 31 maj

Nr 4 15 augusti 15 september

Nr 5 30 september 31 oktober

Nr 6 31 oktober 30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

NI PREZENTAS

Oleg Izyumenko



Kie vi naskiĝis?

Volgodonsk, Rusio

Kie vi loĝas?

Lund, Svedio

Pri kio vi laboras?

Por daŭripovo de la homa civilizo kaj por eviti klimatan katastrofon.

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanto?

Scienc-fikcio, esplorado de kosmo, daŭripova evoluo, verda politiko, ekologiismo, vegetaranismo, justa komerco, klimat-ŝanĝiĝo, filmoj, anime.

Ĉu vi havas familion?

Mi havas gepatrojn, geavojn, fratinon kaj koramikinon, kiu ankaŭ havas sian familion.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?
De kiam mi estis tre juna knabo. Jam en la 1990-aj jaroj.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Dum certaj periodoj mi estis prezidanto de la Moskva junulara Esperanto-klubo, komitatano de TEJO (por Rusio), unu el la unuaj membroj de E@I, teamano de "lernu!", kunorganizanto de kelkaj E-aranĝoj. Nuntempe mi ne havas iun ajn taskon aŭ formalan postenon en la Esperanto-movado.

Kiu estas via preferata libro en Esperanto?

Ĥm, ne ekzistas unu sola libro en Esperanto, kiu estas preferata de mi.

Ĉu ekzistas aliaj interesajoj pri vi?

Mi estas aktivulo en la Verda partio de Svedio (Miljöpartiet De Gröna), kunorganizanto de la junulara klimat-agada movado en Svedio kaj Rusio, ambasadoro por ekologiaj produktoj kaj justkomercaj varoj, apoganto de bestaj rajtoj. Svedaj legantoj povas informiĝi pli pri nia laboro, legante nian junularan klimat-blogon ĉe www.CoolaNer.nu Skribe intervjuis: Leif Nordenstorm

REDAKCIE

Nova epoko

Estas tempo por ankoraŭ unu numero de La Espero.

En tiu ĉi numero oni povas legi pri la reta propomo al la Usona prezidento Obama pri Esperanto instruado. Tio certe estas bona ekzemplo pri tio ke interreto vere signifas novan epokon en la mondo, kiu neniam plu estas la sama kiel antaŭ interreto.

Enkonduko de Esperanto tute certe povus esti la sama ŝanĝo por la mondo. Tial ni senlace - sed per novaj metodoj - laboru por informi pri Esperanto, instrui Esperanton kaj uzi Esperanton. Ne maltrafu la eblecon ricevi senkostajn librojn por doni al la proksimaj bibliotekoj. Legu sur paĝo 6.

Leif Nordenstorm
Via redaktoro

TRA LA MONDO

Danlingve en Danlando

Kiel studento aŭ instruisto altlerneja oni pli kaj pli alfrontas studlibrojn kaj lekcionojn en la angla en niaj universitatoj. En Danlando, kiu famiĝis pro siaj pedagogiaj ofte radikalaj ideoj, la popoldeputitoj devigas la registaron prezenti leĝon laŭ kiu la universitatoj uzu la danan en la instruado ĝis la nivelo de baza ekzameno. La intenco estas ke la dana restu kompleta kaj por la socio fundamenta lingvo. Ĉu niaj svedaj parlamentanoj zorgas?

Laŭ danaj interretaj jurnalo

Årskongress 22-24 maj 2009 i Borlänge

Svenska Esperantokongressen är de svenska esperantisternas traditionella mötesplats. Varje vår anordnas den på något ställe i Sverige. I år står Dalarna på tur.

Kongresspaketet:

innehåller logi, mat och kongressavgift, för ankomst fredag eftermiddag 22 maj, avresa söndag eftermiddag 24 maj.

- Kostar exkl utflykten 1.600 kr per person.

Lägg till utflykten,

som startar kl 9 fredag morgon 22 maj, och går till två berömda resmål i Dalarna, inkl lunch.

- Kostar 650 kr per person.

Lägg också till extra logi och mat 21 maj, om du vill ankomma till Borlänge torsdag eftermiddag den 21 maj, t ex för att hinna med starten på utflykten.

- Kostar 550 kr per person.

Alternativt kongresspaket:

för dig som ordnar logi och frukost själv. Det alternativa kongresspaketet innehåller lunch och kvällsmat och kongressavgift, för ankomst fredag eftermiddag 22 maj, avresa söndag eftermiddag 24 maj. (Lägg eventuellt till utflykten enligt ovan!)

- Kostar exkl utflykten 700 kr per person.

SEJU-möte?

Möte för SEJU-medlemmar planeras, och mer information om kostnader kommer senare.

Andra önskemål?

kontakta kongresskassören.

Inte medlem i Esperantoförbundet?

Kostar 100 kr extra på kongressavgiften.

Gäster bosatta i utlandet

Kontakta kongresskassören om avgifter och betalningssätt. Ange om gästen är medlem i UEA.

Mat-önskemål?

Om du är vegan, vegetarian eller har allergi, tala om det vid anmälan.

Avbeställning

Logi och mat kan avbeställas fram till 5 maj. Kongressavgiften (300 kr), som ingår i kongresspaketet, återbetalas inte.

Anmälningdatum

Anmäl dig före 15 april. Därefter höjs kongressavgiften med 100 kr.

Hur man anmäler sig:

Betala in kongresspaketet och eventuella tillägg till pg 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn (föreningen bistår kongresskommittén med administrationen). Skriv namn, adress, telefon, ev epost-adress på talongen, och anteckna eventuella önskemål om rum och mat. Om du gör internetbetalning, skriv brev eller epost om önskemålen till Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 13542 Tyresö, sefkongr09@esperanto.se, 08-7128291 (kassör i Esperantoföreningen Södertörn).

Logi vid årskongressen Borlänge

Rummen på folkhögskolan har nära till allt på årskongressen, men toalett och dusch finns i korridoren. Det finns också rum reserverade på ett hotell/värdshus på avstånd 30-40 min promenad eller några minuters bilresa, och där har alla rummen toalett och dusch. Om du inte talar om vad du föredrar, så bokar kongresskommittén de först anmälda i rum på folkhögskolan, så långt de rummen räcker, och de senare anmälda på hotellet/ värdshuset.

Kongresspaketet gäller enkelrum. De som vill bo i dubbelrum och anmäler sig tillsammans, kan betala 125 kr per natt per person mindre i kongresspaketets logikostnader. Om tillräckligt många vill bo i flerbäddsrum med mer än tre bäddar (finns bara på hotell/värdshuset), så kan det gå att ordna till ungefär samma reduktion av logikostnaderna.

Nya grepp vid årets kongress

SEF tar ett par nya grepp vid årets kongress i Borlänge. Fast idéerna är kanske inte nya. Det ena är att det blir en snabbkurs för dem som inte ännu behärskar vårt internationella språk, *Esperanto Eksprese*. I första hand kanske avsett för medföljande. Man ska med andra ord inte behöva dela på sig en fin vårhelg bara för att en part ännu inte är esperantist.

Det andra nya är att det blir ett "infanejo", en barnstuga där barn kan leka på esperanto med erfaren ledning. Detta för att föräldrar eller mor- eller farföräldrar själva ska kunna delta i kongressen och ha med sina yngsta. Idén är delvis hämtad från sommarkurserna i Lesjöfors, där den framgångsrikt praktiserats ett tiotal gånger.

Dalarna är ju et vackert landskap, en modell av Sverige med alla landskapstyper. Dock saknas hav, men sjön Siljan är inte heller fy skam. Den får deltagarna i bussutflykten se i samband med lunchen i Tällberg. Övriga huvudattraktioner under utflykten, Falu koppargruva och Dalhalla, presenteras i separata artiklar i detta och nästa nummer av la Espero.

Heldagsutflykten sker för övrigt fredagen den 22 maj. Bekvämast är då förstås att komma till kongressen kvällen före, men för den morgonpigge finns möjlighet att resa samma morgon med tåg som avgår från Stockholm C kl 6.14.

Utflyktsbussen möter i så fall vid tåget i Borlänge.

Kongressen gästas av engelsmannen Paul Gubbins, tidigare journalist och numera professor vid Manchesters universitet. Paul har vunnit priser i belartaj konkursoj och kommer att framför någon av sina teaterpjäser. Han kommer också att föreläsa om Språngbräda till språk, *Springboard to languages*.

Storbritannien delar ett problem med oss i Sverige, svårigheten att intressera ungdomar för att lära sig främmande språk. Men engelska esperantister har nog hittat ett botemedel.

Välkommen till en givande kongresshelg i Dalarna!

Esperanto och språktesterna

År 2001 höll Association of Language Testers in Europe en konferens i Barcelona. Namnet förkortas ALTE och kan möjligen översättas "Sammanslutning av språktestare i Europa". Konferensen behandlade Common European Framework of Reference for Languages (CEFR). På esperanto finns två översättningar av detta: Komuna Eŭropa Referenckadro (KER), respektive Komuna Eŭropa Framo de Referenco (KEFR). På svenska verkar det ännu inte finnas en motsvarande översättning.

Denna KER eller KEFR är en idé, som härrör från Europarådet och syftar bland annat till att skapa jämförbara språktester för olika europeiska språk. Se Folke Wedlins artikel i La Espero 2008:4! ALTE och ALTEs medlemmar har som uppgift att omsätta Europarådets riktlinjer i praktiken.

Esperanto var det tjugofemte språket, som allvarligt engagerade sig i utarbetande av sådana tester, och i den andra ALTE-konferensen (i Berlin i maj 2005) deltog Kultura Centro Esperantista (KCE) som observatör.

KCE har deltagit i alla därpå följande konferenser och fick i november 2007 begränsat medlemskap som så kallad "institutional affiliate" ("institutionellt ansluten medlem" eller möjligen "ansluten institution") i ALTE. Kostnaden för fullt medlemskap är mycket hög och KCE har därför beslutat att tillsvidare inte ansöka om detta. Begränsningen hindrar inte aktivt deltagande i arbetsgrupper: en sådan som KCE deltar i handlar om testning av barn, denaskuloj för esperantos del, en annan om testning av kandidater till anställningar och förtroendeposter.

Liksom i PEN Internacia har esperanto i ALTE mottagits välvilligt utan någon blinkenbergseffekt, vilket beror på att det i båda fallen introducerats utan krav på exklusivitet, vare sig som ersättare eller som beskyddare av andra språk, utan helt enkelt som ett språk bland andra.

KCE har, utom att utarbeta testmallar och utföra tester, påtagit sig att rekommendera och vid behov och efter förmåga producera lämpliga läromedel, utbilda testare och kontraktera andra institutioner, som ska kunna fungera som testfilialer.

Under två ALTE-konferenser år 2008 (i Cambridge och Lissabon) har också ILEI/UEA funnits med. Vid det senare tillfället väckte det en viss uppmärksamhet, som av KCE tolkades som positiv, att samma språk hade representanter från två institutioner, KCE och UEA. Dessutom har UEA låtit översätta och gett ut det styrdokument, som gett namn åt hela företeelsen: "Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado".

I februari-numret 2008 av UEAs medlemsorgan "Esperanto" aviserades att de första esperantotesterna planerats till slutet av 2008. I verkligheten utfördes de redan i juli 2007 och fortsätter oavbrutet sedan dess. Skillnaden beror på att UEA bara rapporterar vad som berör den egna organisationen och ILEI, vilket ger en alltför blygsam bild av läget.

Europas esperantister kommer de närmaste åren att göra två vägval, som delvis hänger samman:

Man kommer antingen att bestämma sig för att upprätthålla en enhetlig form för testerna, vars kvalitet garanteras genom samarbetet inom ALTE, eller också kommer olika organisationer och institutioner att

Nya esperanto-examen

Det nya värderingssystemet för språkkunskaper tillämpades under Internacia Festivalo i Düsseldorf under nyårshelgen. Europarådets ramverk med sex standardiserade kunskapsnivåer gör att kunskaper i Europas språk nu kan jämföras objektivt. Därmed borde förutsättningarna också finnas för att kunna bevisa vad alla esperantister redan vet, men som inte kunnat vetenskapligt fastställas tidigare, nämligen att esperanto är mycket lättare att lära sig än andra språk.

Omkring 160 deltagare från 22 länder (varav två svenskar) hade samlats i Düsseldorf för att både delta i ett rikt seriöst program och festa in det nya året.

HDP, det vill säga Hans-Dieter Platz och hans medarbetarstab stod för en närmast perfekt fungerande organisation, en festival med rikt kunskapsmässigt och kulturellt innehåll. Armi Wandel från Israel och Renato Corsetti från Italien genomförde ett "vinteruniversitet" som behandlade teleskopet och kosmos respektive lingvistikfrågor.

Plötsligt meddelades det att examinering enligt Europarådets ramverk kunde ordnas om intresserade fanns, och det fanns det. Tills vidare finns tre nivåer för esperanto, B1, B2 och C1. De två A-nivåerna anses alltför enkla. C2 är ännu inte aktuellt, alltså den högsta möjliga kunskapsnivån. Två examinatorer genomför den muntliga delen på plats medan den skriftliga delen sänd till en högskola i Ungern för granskning. Till skillnad från tidigare ställs i denna examen inga frågor om esperantorörelsen eller kulturen.

Hur många som tog examen vid premiärtillfället är i skrivande stund inte känt.

Bengt Nordlöf

Kio estas lingvolanĉilo?

En la kongreso en Borlänge okazos prelego pri la projekto pri Esperanto kiel lingvolanĉilo en Britio.

Unue nepras diri, kio Lingvolanĉilo (Springboard to Languages) ne estas. Multaj kredas, ke la projekto celas instrui Esperanton en britaj lernejoj. Efektive, ne. Se iniciatintoj de la projekto estus irintaj al edukaj instancoj en Britujo, dirante, ke ili volas instrui en unuagradaj lernejoj Esperanton (lingvo, laŭ brita subministro pri edukado, sen "aparta kulturo"), la ideo estus tuj mortinta. Necesis pli ruze agi. Rezulte, Lingvolanĉilo proponas programon por subteni lernadon de fremdaj lingvoj kaj konsciigi pri bazaj lingvaj principoj. Tion la projekto realigas per Esperanto, kies travidebleco helpas al lernantoj ekkompreni, kiel funkcias lingvoj. Esperanto servas ankaŭ kiel speco de ŝlosilo-lingvo, kiu ebligas kompari vortojn en diversaj lingvoj: ekz. Esperanto "fenestro"; franca "fenêtre"; germana "Fenster"; angla "defenestrate", ktp. Tamen kiamaniere Lingvolanĉilo praktike realigas? Kiugrade ĝi sukcesas? Kaj kio pri la estonteco? Jen temoj de la prelego.

Paul Gubbins



utarbeta egna tester, som på olika sätt tolkar Europarådets direktiv.

Antingen kommer esperantocentra som Grésillon, Kvinpetalo, Hertzberg, Esperanto-Gården m. fl. att skaffa sig kompetens och befogenhet att inom sina respektive geografiska områden genomföra tester (enhetliga eller divergerande) eller kommer de att avstå från att utnyttja den möjligheten.

Agneta Emanuelsson

Ordf ILEI-se

Bertil Nilsson

Vickonsulo pri Edukado en Esperanta Civito

ESPERANTO-HISTORIO

Ekstereŭropaj esperantistoj prelegintaj en Svedio

La bildo venas de la revuo "La Praktiko", apr. 35, p.9:

Ĉi tiu ĉarma bildo montras nian ŝatatan hindan samideanon, s-ron Haĝi Raden Mustafa el Batavia (insulo Java en Nederlanda Hindujo), kiam li en

Sur ekspozicia ekrano en la klubejo de la Esperanto-klubo Norrköping 'La Venkonta Stelo' troveblas fotoj de pluraj eksterlandaj vizitintoj: apud la estono Henrik Seppik, troviĝas ankaŭ Lakshmiswar Sinha, el Hindio, Haĝi Mustapha Raden el Indonezio kaj Kola Ajayi el Niĝerio. Ĉiuj vizitis Svedion en la 1930aj jaroj. En ĉi tiu artikolo ni volas iom prezenti la ekstereŭropanojn al vi kaj samtempe peti tiujn legantojn inter vi kiuj memoras pri tiuj vizitintoj, havigi tiujn informojn, tiel

Federacio, ĉiumonate parolante en 25 lokoj. Heroldo de Esperanto en marto 1935 sciigis ke efektive post la Stokholma Universala Kongreso en 1934, li komencis sukcesan prelegvojaĝon tra Svedio kaj daŭre tion faris. Alice Johansson, membro de la E-klubo 'La Venkonta Stelo', ankoraŭ memoras pri lia veno al Norrköping.

1929 li komencis prelegvojaĝon en Svedio, Estonio, Latvio kaj Pollando. En la sama jaro eldoniĝis lia historia drameto Sivaĝi. En aŭgusto 1931 li devis reiiri al Hindio, kie li laboris por Esperanto verkante artikolojn kaj kiel Delegito de UEA.

En la aŭtuno de 1933 li revenis al Svedio. En 1936 li aperigis la libron Hinda rigardas Svedlandon. Li tradukis la rakontojn de Rabin-dranath Tagore, Malsata ŝtono, el la bengala. Tiu libro en 1961 eldoniĝis en Malmö ĉe Eldona Societo Esperanto, kiel unua libro de la Serio Oriento-Okcidento. Li mortis la 22-an de aprilo 1977 en Shantiniketan, Hindio.



Nathaniel Kola AJAYI naskiĝis la 23-an de aprilo 1906 en Warri, Niĝerio. Li estis angla ŝtatano sed de joruba deveno. Li esperantistiĝis en 1931 en Bydgoszcz, Pollando. Li estis la unua Cseh-metoda lernanto de Jean Fethke. Ekde 1932 li prelegis en Esperanto pri Afriko antaŭ neesperantista publiko. Li havis en Pollando 45 prelegojn en 22 urboj, en tiama Ĉeĥoslovakio 33 prelegojn en 21 urboj (aprilo-majo 1933). En Jugoslavio li havis ĉ. 27 prelegojn en 1933 kaj 30 en 1934. Poste li venis ankaŭ al Svedio. Jean Forge en sia novelaro La verda raketo dediĉis al li la rakonton Nia nigra filo.

Eble ankaŭ vi memoras ion pri iu el la supre menciitaj prelegantaj rondvojaĝintoj? Se jes, ne hezitu kaj sciigu tion al Heidi Goes, kiu daŭre esploras pri la movado en Afriko kaj Indonezio sed tamen ankaŭ bonvenigas informojn pri Lakshmiswar el Hindio.

Kontaktigu perletere al Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge, Belgio, aŭ rete pere de <heidi.goes@gmail.com>.

Heidi Goes

Fontoj:

Kökény, L. & V. Bleier (red.), 1933-34, Enciklopedio de Esperanto, Vol. I-II. Budapeŝto: Literatura mondo.

La Praktiko, 1932 1/1:p.[8]

Heroldo de Esperanto, 1935 11/9: p. 3

http://eo.wikipedia.org/wiki/Kola_Ajayi

<http://www.muweb.cz/Kultura/malovec/5>

2HISTOR.HTM

http://eo.wikipedia.org/wiki/Sinha_Laksmi

swar

Intervjuo de Alice Johansson fare de Haldo Vedin, oktobro 2008.



la sveda urbeto Torskors klarigas al la scivolaj Esperantistaj infanoj la enhavon de la freŝa numero de La Praktiko. Inter la infanoj staras (dekstre) ilia instruisto, nia agema samideano s-ro Fritiof Ahnfeldt. S-ro Raden Mustafa diligente kaj bonsukcese daŭrigas sian utilan prelegvojaĝon tra Eŭropo. Liaj Esp-lingvaj paroladoj havas ie grandan publikon."

ke tiuj memoroj ne perdiĝu (vidu malsupre por kontakteblecoj). Komuna trajto de tiuj ekstereŭropanoj estas ke ili ĉiuj tri lernis Esperanton dum restado en Eŭropo, kaj poste prelegis kaj rondvojaĝis en pluraj eŭropaj landoj.

Haĝi Raden MUSTAPHA, java ĵurnalisto, naskiĝis la 11-an de septembro 1911 en Semarang (tiama Nederlanda Hindio, nun Indonezio). En 1929 li forlasis sian landon kaj vizitis 16 eŭropajn landojn kaj 6 ekstereŭropajn. Li esperantistiĝis en Prago en 1931. Laŭ la aranĝo de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista li faris inter la 15-a de februaro kaj la 27-a de marto 1934 prelegvojaĝon en Ĉeĥoslovakio. Li prelegis en Esperanto kun ĉeĥa interpretado pri la temo "Javo kaj la paradiza insulo Bali". De septembro 1934 ĝis majo 1935 li planis paroladi en Svedio laŭ la invito de Sveda Esperanto-



SINHA, Lakshmiswar naskiĝis en Rarisal en 1905 kaj estis instruisto de slojdo en Santiniketan, Bengalio. Li studis slojdon (pedagogiaj manlaboroj) en Svedio, tie lernis Esperanton en 1928 kaj faris ĉiujn ekzamenojn de SEL. En septembro

Buntaj jarraportoj

Efter 10 augusti har det kommit gåvor för olika ändamål från diverse givare till minne av Karl Buremo och Sigurd Olsson, samt från Roland Lindblom, Ulla Luin, Martin Persson, Esbjörn Stridell och Åke Waller. Totalt har under året inkommit 20 070 kr som gåvor.

Genom års- och månadsvisa inbetalningar till Rondo Langlet har det kommit in 32 460 kr.

Alla bidrag till verksamheten är välkomna, stora som små. De är nödvändiga för ett aktivt arbete och styrelsen tackar hjärtligt för alla bidrag.

En la jarraportoj pri 2008 niaj kluboj raportas pri siaj agadoj.

Amika Rondo en Sundsvall i.a. Havis komunan renkontiĝon kun la geesperantistoj en Härnösand, kie ni havis belan printempan feston. Oni aranĝis kunvenon por bonvenigi esperanto-parolantan gaston el Japanio, kiu vizitis nian landon inter alie por lerni la svedan lingvon.

Okaze de la tago de la Unuiĝintaj Nacioj, la 24-an de oktobro, Amika Rondo havis la eblecon informi pri esperanto en du Sundsvallaj gimnazioj: Västermalm kaj Hedbergsga. Oni aranĝis tablojn kun diversaj esperantaĵoj. Geinstruistoj kaj gelernantoj montris vivan intereson.

La Venkonta Stelo en Norrköping jarfine havas 36 membrojn. La klubo dank'al nia kunlaboro kun NBV senkoste disponigis al si la kunvenejojn. Ni menciuj kelkajn ekzemplojn pri klubkunveno. Foje oni aranĝis Jeopardy-konkurson. Aliffoje unu persono ludis trombonon kaj informis pri ĝia historio. En la 13-a de decembro estis tradicia antaŭkristnaska festo.

Publika informado: Agneta Emanuelsson estis intervjuata en Radio Sörmland dum unu horo kaj ankaŭ informis pri Esperanto en la urba biblioteko dum unu posttagmezo. Kune kun la biblioteko, la kultura administrado de la komunumo kaj SFI (Sveda por enmigrantoj) ŝi aranĝis ĉiusemajne lingvokafejojn.

La klubo organizis konversaciajn studrontojn.

Dum la jaro oni pagis UEA-kotizojn por kvin esperantistoj en Angolo kaj Kongo-Brazzaville. Regulajn kontaktojn ni havis kun la kluboj en la ĝemelurboj Riga en Latvio, Tampere en Finnlando kaj Trondheim en Norvegio.

La Esperantoklubo de Stokholmo havis 82 membrojn. Oni havis kunvenojn ĉiusemajne dum la pintempo kaj aŭtuno.

Tradiciaj estas printempa kaj luma festoj. Dum la somero la klubo organizas kafefajn renkontiĝojn.

En marto la klubon vizitis junaj esperantistoj el Italio kaj Litovio. Ili venis pere de pasporta servo. Oni konstatas ke oni bezonas pli da gastigantoj.

Esperanto- förlaget lättar på lagret

Esperantoförlaget har bestämt att man skall skänka bort en del av sitt lager till utbildningsanstalter (grundskolor, gymnasier, folkhögskolor och universitet) och kommunala bibliotek.

Det rör sig främst om ett begränsat antal exemplar av böckerna

* Ordbok svenska-esperanto

* Esperantokompendium

* Nemesis.

Orsaken är att lagret av dessa böcker är så stort så att böckerna kommer att bli föråldrade om vi inte lättar på lagret.

Esperantoklubbar och enskilda som vill hjälpa till att förmedla böcker kan ta kontakt med Anita Dagmarsdotter på eldona@telia.com eller telefon 031-55 53 37.

Enskilda och klubbar som behöver böcker får även fortsättningsvis betala för dem.

7,5 hp esperanto

Under vårterminen kommer kursen "Introduktion till esperanto - 7,5 hp" att ges av Stockholms universitet på institutionen för lingvistik. Kursen som till stora delar är baserad på "lernu!" kan läsas på distans, men kommer även att ha frivilliga träffar ca varannan vecka. Alla som gått ut gymnasiet kan söka kursen, t.ex. via <http://sisu.it.su.se/info/index/LIE101>. Undervisningen kommer att ges av Sonja Petrovic Lundberg som även jobbar med lernu.net.

Vill du veta mer om kursen kan du skriva till sonja@ikso.net.

Vi hoppas på att många vill anmäla sig till kursen! (Villkoren för att kursen ska ges är minst 20 anmälda.)



Vojaĝrakonto

Kelkaj vojaĝoj bonas, interesas, instigas... Kelkaj simple ne. Pro diversaj kialoj. Dum la aŭtuno mi vojaĝis, unue al la kultura esperantoaranĝo Arkones en Pollando, poste trajne por esplori kaj pasportaservumi en centra Eŭropo. Estis por mi grava vojaĝo kun multaj belaj momentoj, kiuj ne pri-skribblas mallonge.

Arkones estis mia unua granda esperanta renkontiĝo. Ĝi ofertis belajn homojn, koncertojn, poemojn, teatraĵojn kaj por mi grandan eblecon paroli kun interesaj homoj el diversaj landoj. Ni, La Perdita Generacio, koncertis la unuan nokton. Tial, la unua tago enhavis provludadon kaj aliajn preparadojn por la meznokta koncerto. Post tio mi povis koncentriĝi pri aliaj programeroj kaj ĝuis la aranĝon. Tro rapide pasis la tri tagoj.

Post Arkones sekvis dusemajna pasportaserva trajnvojaĝo suden. Kun Tomio mi esperantumis kaj esploris interesajn urbojn (ekzemple Bratislavo, Budapeŝto, Zagrebo kaj Vieno). Ni ĝuis belan naturon, profundigis niajn historiajn sciojn, naĝis en "kuraĉlago" Hévíz en Hungario kaj plej grave renkontis multajn karajn helpemajn, kaj novajn kaj malnovajn amikojn.

Ĝenerale mi estas sufiĉe planema persono. Sed dum ĉi-tiu vojaĝo klare videblas ke ne ĉiam indas plani kion fari. Multe pli bone se eblas nur sekvi la venton, multe pli da interesaj aferoj povas okazi tiam. Tute ekzotika kaj bela sperto estis vinberrikoltado ĉe esperantisto Ivica sur la insulo Brač en suda Kroatio. Ni bone komprenis unu la aliajn – eble ĉar ni ĉiuj estas insulanoj ☺ Post tio iris ni okcidenten al Istria vilaĝeto Motovun. Pro malbonplanado ni subite estis en malgranda urbo sen transportilo tridek kilometrojn antaŭ la celo. Ni decidis petveturi kun nia (sufiĉe ampleksa) pakajo. Post unu horo malnova jam sufiĉe plena aŭto kun tri agrabluloj haltis kaj kunportis nin. Bonŝance – pro malbonplanado la vojaĝo iĝis multe pli interesa ol la busirado estintus!

La diversaj impresoj dum la vojaĝo plenigis min kaj rapide kreskigis emon plani novan – malbonplanitan – esperantan vojaĝon. ☺

Karin Nordström

DEZIRAS
KORESPONDI

Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Ni petas vin anonci al viaj membroj pri nia servo jene:

Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al Koresponda Servo de Japano Esperanto-Instituto Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3 Tokio, Japanio Skribante al ni korespond-peton. bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

Koresponda Servo de Japano Esperanto-Instituto Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanioj

Fabelkonkurso

Kiam Miranda Wilson, 12 jara filino de Berit Posthuma, legis la alvokon en Juna Amiko de aprilo 2008, ŝi komencis verki fabelon kun la titolo "Kiam la ranoj havis felon" aŭ laŭ la intenco kial ranoj ne plu havas felon kaj nun estas nudaj.



Kial ŝi havis tiun ideon? Antaŭe ŝi skribis rakontojn pri strangaj situacioj en la sveda. Post aprilo 2008 ŝi ne povis neakcepti la defion eĉ verki ion en Esperanto. La lingvon ŝi scias sufiĉe bone dank'al multjara partopreno dum la somerkursoj en Lesjöfors, memstudado kaj legado. La ideon de la fabelo ŝi kaptis de antaŭa gajninto de la fabelkonkurso, kiu verkis fabelon "Kial testudo havas kirason" aŭ laŭ la intenco "kial testudoj ne plu havas karapacon,"

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. Fabelo estas mallonga (1-5 folioj) konsekvenca rakonto, ligita al la infana mondo kaj karakterizata de sorĉeco, mistereco kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas atmosferon fascinan al infanoj. Rakonto pri ĉiutagaĵoj aŭ disvolvanta temon el la reala mondo, eĉ se lerte verkita, ne estas konsiderata fabelo.

La konkurson organizas la finna kultura Literatura Centro en Taivalkoski. En 2000 la instituto aldonis esperanton.

Miranda gajnis la unuan premion en la kategorio C por infanoj inter 11 - 13 jaraj.

Ne antaŭe juna sveda infano, sciante Esperanton, gajnis premion.

Rigardu por pli da informoj www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm.

Wim Posthuma

Kiam la ranoj havis felon

Antaŭ kelkaj jarcentoj, kiam ĉiuj bestoj havis felon aŭ plumojn, vivis rano kiu estis eltrovema, sed persista.

En unu malvarma vespero, kiam li revenis el la arbaro, kaptinte insektojn por manĝi, li eksentis sin dormema.

Li rapidis al sia dormnesto por dormi. Sed li ne povis ekdormi, ĉar li malvarmiĝis. Mi bezonus kovrilon, kiu varmigus min, la rano diris al si mem.

Dirinte, kaj farinte la rano elnestigis por serĉi materialon por kovrilo.

Apud la malgranda strando, blanka cigno staris kaj rigardis la horizonton. La rano saltetis al li kaj demandis:

–Bela kaj eleganta cigno, donu al mi kelkajn plumojn el via korpo.

–Ne, la plumoj apartenas mia korpo, kaj mi ne volas ke kota rano malpurigos ilin. La blankkolora cigno ekmovigis siajn flugilojn kaj flugis for. Tamen la rano ricevis siajn deziratajn plumojn, ĉar la cigno perdis ilin kiam li forflugis.

La rano iris hejmen kun la plumoj, el kiuj li faris kovrilon. Poste li enlitiĝis, li dormis longe kaj komforte.

Sed la sekva tago lin vekigis la cigno.

–Nu, mi ne permesis vin preni miajn plumojn, sed vi ne obeis. Nun mi volas havi ilin returne.

–Vi ne ricevos la plumojn. Tiuj nun estas miaj.

–Tion vi bedaŭros, sed estas via kulpo, diris la cigno kaj forflugis.

La rano ne aŭdis la lastajn vortojn de la cignon kaj redormis. Sed post mallonga momento, la cigno denove venis

Nun ne estis unu cigno, estis kvar grandaj cignoj kiuj rompis la neston.

Ni protestas, ni protestas, ni volas niajn plumojn returne, diris la plej granda el ili

–Ŝtelisto! Maliculo!, kriis ĉiu.

–Fakte mi faris kovrilon el la plumoj, do mi ne povas redoni ilin, respondis la rano.

–Via pediko, vi detruis miajn plumojn!, Nun estis la cigno, kiu estis apud la strando, kiu parolis.

–Mi neniam faros tion denove, Neniam! Mi petas, pardonu min, diris la rano.

–Ne, vi prenis niajn plumojn, nun ni prenos vian felon.

La cignoj ekŝiris for la felon de la rano per iliaj bekoj, kaj ridegis moke.

Po med andra ord

Det lilla ordet *po*, en preposition som används när något ska fördelas, och beroende på sammanhang kan översättas med *varje*, *vardera*, *var* (*sin*), *à* eller *per styck*, kan ibland vara knepigt att använda på rätt sätt. Ett exempel som *li donis al la du infanoj po dek kronoj*, 'han gav de två barnen vardera tio kronor' är kanske okomplicerat, men det kan vara lätt hänt att utifrån den konstruktionen betrakta *po* som en direkt motsvarighet till 'per (styck)' och uttrycka en hastighet, till exempel *hundra kilometer i timmen* (*per timme*) som **cent kilometroj po horo*.

Om man tolkar *po horo* som att avse *en timme* (*po unu horo*), blir betydelsen förvisso att man åker "hundra kilometer varje timme", men med fokus på att förflyttningen sker just varje timme, inte nödvändigtvis att man åker med en viss hastighet 'i timmen'. Ett mer korrekt uttryck skulle istället vara *po cent kilometroj en ĉiu horo* eller *po cent kilometroj hore*. För just *per timme* i dylika uttryck föreslår Bensons Comprehensive English–Esperanto Dictionary istället konstruktionen *cent kilometrojn en horo* eller *cent kilometrojn hore*, alltså utan *po*.

I många fall går det med andra ord att komma runt *po*, till exempel med omskrivningar som *li donis tri pomojn al ĉiu el ili* 'han gav tre äpplen till var och en av dem' istället för *li donis al ili po tri pomoj* 'han gav (till) dem vardera tre äpplen'. Det kan vara bra att veta om man vill undvika missförstånd eller felsyftningar, eller bara känner sig lite osäker.

Olof Pettersson



Daŭrigo dekstre.

La rano kriis:

–Ĉesu, ĉesu! mi petas, ĉesu!

Sed la cignoj daŭrigis dolorigi la ranon. Fine la cignoj forflugis kaj forlasis la honteman kaj tute nudan ranon.

Post tiu tago, neniu rano naskiĝis kun felo.

Miranda Wilson

RECENZO

Pri la sinsekvo de la vortoj

Naturaj vortordoj en Esperanto. Wim Jansen. UEA. Rotterdam. 2008. 40 paĝoj.

La malabundaj eksplicitaj reguloj pri la vortordo, donitaj de Zamenhof por Esperanto, permesas multe da libero. Simila libereco ankaŭ ekzistas en kelkaj etnaj lingvoj kiel la rusa. Ĝi ebligas aperigi la vortojn en ordo kiu plej konvenas pragmatike.

En tiu broŝuro, kiun Wim Jansen verkis surbaze de sia ampleksa nederlandlingva disertaĵo, estas montrita ke ankaŭ la vortordoj observeblaj en praktika Esperanto respegulas la pli-malpli ĉiulingvan tendencon ordigi la frazerojn en pragmatike konvena ordo. Ankaŭ por tiu ordo, oni povas doni eksplicitajn regulojn kiel la jenaj jam konataj de lingvistoj:

- Menciui vian temon antaŭ ol komenti pri ĝi.

- Menciui la jam konatan antaŭ la nova.

- Menciui la difinitan antaŭ la nedifinita.

- Menciui la pli simplan antaŭ la pli komplika.

La aŭtoro klarigas la aperon de nebazaj vortordoj en praktika Esperanto per la tendenco sekvi tiujn kaj aldonajn pragmatikajn regulojn. Kvankam li ne atentigas pri tio, lia esploro tamen ankaŭ konfirmas, ke Esperantistoj kies denaskaj lingvoj ne ofertas samampleksan liberecon ofte ne plene utiligas tiun kaj, ekzemple, uzas la bazan vortordon SVO (subjekto-verbo-objekto) ankaŭ en kazoj en kiuj alia ordo estus pli konvena.

Tiu kvanta kaj kvalita studo ankaŭ informas pri la loko de la adjektivoj, la negacio, la adverboj kaj la nereka objekto. Esplorigis korpuso konsistanta el lastatempaj jarkolektoj de Monato kaj la revuo Esperanto. Ankaŭ esplorigis la lingvouzo de stabanoj de la Centra Oficejo de UEA kaj de nederland- kaj franclingvaj esperantistoj. En la fina ĉapitreto, la aŭtoro korektas ses simplajn sed ne tute verajn asertojn troveblajn en lernolibroj.

La broŝuro prezentas interesan kaj pensigan legaĵon por legantoj kun lingva intereso. La enkondukaj ĉapitroj finiĝas per 13 konkretaj demandoj. Tiuj tamen ne estas respondataj unu post la alia en la sekvaj ĉapitroj, sed tie la temo estas traktata iom pli ĝenerale. Ne tute mankas diskutindaj dubindaĵoj, sed la verketo estas nepre leginda por verkistoj de lerniloj kaj instruantoj de Esperanto. La menciitaj demandoj estas bonaj ekzamenaj demandoj, kiujn atentaj legantoj povos respondi mem post finlegado.

Hartmut Trau Müller

TRA LA MONDO

Reta propono al Obama

Dum la lastaj tagoj de decembro en multegaj esperantistaj retforumoj cirkulas instigoj voĉdoni por propono enkonduki Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon en la lernejoj de Usono. La propono dum iom da tempo estis la plej populara en sia kategorio, kaj multaj esperantistoj ajnas kredi, ke la rezulto de la reta voĉdonado efektive povus iel influi la politikon de la estonta prezidento de Usono. Tamen la koncerna paĝaro eĉ ne apartenas al la teamo de Barack Obama.



La kampanjo por enkonduki Esperanton en la lernejoj de Usono estis lan ĉi la 26-an de novembro de Oleg Izjumenko, rusa studento loĝanta en Svedio, en propono, kiun li enskribis en la retejo change.org.

En sia propono li uzas la oftan sed science ne pruvitan argumenton pri ia speciala lernofaciliga valoro de Esperanto:

Per aktiva diskonigado de la voĉdonado la amikoj de Esperanto en la lastaj tagoj sukcesis kolekti pliajn voĉojn. La baloto estos fermita noktomeze la Kalifornia horo, kaj malpli ol du tagojn antaŭ la limhoru la propono pri Esperanto kun siaj 1.580 voĉoj denove estis en la tria loko, kun ŝanco pluri al la fina vo donado.

Malmultaj el la voĉdonintaj esperantistoj tamen komprenis, ke la retejo change.org tute ne estas la oficiala retejo de la teamo de Barack Obama - tiu havas la retadreson change.gov. La retejo kie okazas la voĉdonado apartenas al grupo de aktivuloj en Kalifornio, kaj la rezulto de la voĉdonado kompreneble neniel rekte povos influi la politikon de Barack Obama.

Laŭ www.liberafolio.org

Äntligen i ny upplaga:



Esperanto! Nyckel till det internationella språket har kommit i en ny upplaga. 15 x 10,5 cm. 48 s. Beställ flera till klubben eller för att ge bort till julklapp, 2 ex, 40 kr; 5 ex, 100 kr; 12 ex, 220 kr; 25 ex, 375 kr; 50 ex, 600 kr; 150 ex, 1200 kr.

Dessa priser inkl. porto.

Esperantoförlaget, Masthuggsliden 1, 413 18 Göteborg, eldona@telia.com, 031 - 12 05 94

Information om andra böcker :

www.algonet.se/~eldona

Novelaro aperonta!

Eldona Societo Esperanto planas eldoni novelaron kun noveloj verkitaj en 2000-2009. Ni invitas ĉiujn verkemulojn sendi novelojn prefere retpoŝte al esperanto@globalnet.net aŭ papere al Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11, SE-961 76 Boden, Svedio. Ni ne resendos manuskriptojn.

Limdato: 1a de Aprilo 2009.

Eldona Societo Esperanto